# Ekzercoj por VENUS' LA FINA VENK' --- Sceno ok

Rimarko: por solvi la taskojn, unue legu la okan scenon de la teatraĵo ***Venus' la fina venk'.*** La teksto troviĝas en la LERNILOTEKO.

## 1) VORT-DIFINOJ

*Ligu la vortojn el la scenoj kun konvena difino. Vi havas du nebezonatajn difinojn, nur por malfaciligi vian tagon. Nedankinde!*

Unua parto

| | |
|---|---|
| 1. bongusta -------------------- | A. vivo-fino |
| 2. kredi -------------------- | B. speco de serpento |
| 3. telero -------------------- | C. plata objekto por teni manĝaĵojn |
| 4. malpermesata ----------------- | Ĉ. malteda |
| 5. mordo -------------------- | D. malatenti |
| 6. peko -------------------- | E. logi al malbona faro |
| 7. ignori -------------------- | F. kontraŭleĝa |
| 8. tenti -------------------- | G. fidi, imagi |
| 9. vipuro --------------------- | Ĝ. fiago |
| 10. interesa --------------------- | H. buŝpleno |
| | Ĥ. atenti zorge |
| | I. agrable manĝinda |

## 2) UNU EL KVAR

*Jen frazoj aŭ demandoj pri la sceno. Sed mankas vorto aŭ vortoj aŭ respondo. Vi jam imagas la ludon! Ni proponas al vi kvar alternativojn, el kiuj nur unu estas ĝusta. Elektu tiun!*

**1. Foriris de la tero al Venuso ______**

a) tri homoj.
b) du homoj kaj pomo.
c) du pomoj kaj homo.
ĉ) tri pomoj.

**2. Alvenis al Venuso ______**

a) tri homoj.
b) du homoj kaj pomo.
c) du pomoj kaj homo.
ĉ) tri pomoj.

**3. Kio okazis al la alveninta pomo? Ĝi ______**
a) transformiĝis al Ŝlej.
b) estas manĝita de la serpento.
c) estas manĝita de Deb.
ĉ) ekparolis pomlLe.

**4. Trev diris "Ni alvenis. Ni ________.**
a) aktivis
b) travivis
c) deklivis
ĉ) detektivis

**5. Trev demandis al Deb ĉu ŝi bone ________.**
a) faras
b) farbas
c) farĉas
ĉ) fartas

**6. Kia estas la vipuro?**
a) Tento-serpento.
b) Atento-serpento.
c) Atenco-serpento.
ĉ) Korpulento-serpento.

**7. Deb, manĝinte, diris ke nun ili _________.**
a) parolu
b) preĝu
c) peku
ĉ) brosu la dentojn

*Pro la mallongeco de ĉi tiu sceno, kaj la devo starigi al vi dek demandojn, neniu alia eliro estas ol testi viajn kapablojn pri sun-sistema geografio. Ek!*

**8. La venusa jaro, kompare al la tera, estas ________.**
a) pli longa
b) pli mallonga
c) egale longa
ĉ) neniuj el tiuj

**9. La dumtaga venusa klimato, kompare kun la tera, estas _________.**
a) pli varma
b) malpli varma
c) egale varma
ĉ) ĉiuj el tiuj

**10. La distanco de la suno al Venuso estas _________ ol la distanco inter la suno kaj la tero.**
a) pli
b) malpli
c) foje pli, foje malpli
ĉ) (nesciebla ĉar neniu sciencisto ĝis nun sukcesis mezuri tion)

## 3) MIKSITAJ VORTOJ

*Jen kelkaj vortoj el la sceno. Sed la literoj estas miksitaj. Malmiksu ilin kaj skribu la vortojn en la korespondaj spacoj aŭ kvadratoj. Fine, prenu la literojn kiuj sidas en la kvadratoj kaj rearanĝu ilin por malkovri la kompletigon de la kaŝ-frazo sube. En malmultaj kazoj (tre malmultaj!) ni kompatas vin kaj jam donas literon, sed nun tamen ne temas pri tia helpo.*

| | |
|---|---|
| V I S T A V I R | ☐ ☐ ☐ _ _ _ _ _ |
| I E S T E R N E | _ _ _ ☐ ☐ ☐ _ _ |
| S A P E R A | _ _ ☐ ☐ ☐ _ |
| R I T A V U A L | _ _ ☐ _ _ _ ☐ _ |
| I U P R O V | _ _ _ _ _ ☐ |

Kio okazas sur Venuso je la alveno de la vojaĝantoj?

_ _ _ _ _ _ _ - _ _ _ _ _.

## 4) DEMANDOJ

1. Kie okazas la sceno? Kiom da roluloj estas?
2. Unu rolulo malsamas al la aliaj. Kiusence?
3. Kion la vojaĝintoj faras tuj post la alveno?
4. Kial la parolo de Deb estas konsterna?
5. Kio alvenas sur la tria telero? Kio devintus veni?
6. Kion Deb deziras fari pri la surhavo de la tria telero?
7. Kiu kuraĝigas ŝin en tiu klopodo?
8. Kiu malkuraĝigas ŝin en tiu klopodo?
9. Kiu el tiuj du influantoj gajnas?
10. Al kiu historia tera sceno ĉi tiu venusa iomete similas? Kiel?

## 5) PARIGU

*Jen demandoj pri la tuta teatraĵo, ĉar tiom eta sceno ne meritas propran parigan ekzercon. Ni prezentas la antaŭnomojn kaj familiajn nomojn de la roluloj, ankaŭ priskribon. Ligu ilin.*

| Antaŭnomo | Familia nomo | Priskribo |
|---|---|---|
| **1.** Adela | **A:** Aktera | **A:** Estraranino kiu posedas (kaj purigas) kalkulilon. |
| **2.** Alano | **B:** Arbema | **B:** Prezidanto de la esperantistoj. |
| **3.** Aldo | **C:** Bori | **C:** Sciencisto kiu ĉefe volas enspezi. |
| **4.** Bart | **Ĉ** Elfrunt | **Ĉ** Sekureca gardisto en la laboratorio. |
| **5.** Bur | **D:** Elobat | **D:** Volapukisto, posteulo de ĝia kreinto. |
| **6.** Deb | **E:** Ernep | **E:** Proceduremа oficisto en la Centra Oficejo. |
| **7.** Derek | **F:** Gemul | **F:** Estrarano pri publikeco post foriro de Trev. |
| **8.** Jonathan | **G:** Gorul | **G:** Diligenta sciencisto kiu prizorgas la komputilon. |
| **9.** Ken | **Ĝ:** Ireprevu | **Ĝ:** Estrarano pri komputado. |
| **10.** Klari | **H:** Isobata | **H:** Pomo, kiu transformiĝis al viro. |
| **11.** Krista | **Ĥ:** Konvink | **Ĥ:** Estrarano pri trookupiteco kaj kalkulil-sabotado. |
| **12.** Kunio | **I:** Lett | **I:** Japana fizikisto. |
| **13.** Lari | **J:** Miemas | **J:** Idistino kaj rigora forlasistino de akuzativoj. |
| **14.** Leks | **Ĵ:** Nagras | **Ĵ:** Estrino de la sciencistoj. |
| **15.** Linda | **K:** Nektita | **K:** Estraranino pri instruado. |
| **16.** Mart | **L:** O'Krat | **L:** Helpema oficisto en la Centra Oficejo. |
| **17.** Meri | **M:** Periment | **M:** Viktimo de multaj eksperimentoj. |
| **18.** Mike | **N:** Servi | **N:** Estrarano pri publikeco ĝis lia forlaso de la tero. |
| **19.** Miko | **O:** Tavoj | **O:** Laboratoria asistento. |
| **20.** Oskar | **P:** Tistik | **P:** Sciencisto kaj viktimo de unu eksperimento. |
| **21.** Ŝlej | **R:** Toplen | **R:** Estrarano pri elirpunktoj kaj prognozoj. |
| **22.** Trev | **S:** --- | **S:** Piro, kiu transformiĝis al viro. |

| Antaŭnomo | Familia nomo | Priskribo |
|---|---|---|
| **1.** Adela | | |
| **2.** Alano | | |
| **3.** Aldo | | |
| **4.** Bart | | |
| **5.** Bur | | |
| **6.** Deb | | |
| **7.** Derek | | |
| **8.** Jonathan | | |
| **9.** Ken | | |
| **10.** Klari | | |
| **11.** Krista | | |
| **12.** Kunio | | |
| **13.** Lari | | |
| **14.** Leks | | |
| **15.** Linda | | |
| **16.** Mart | | |
| **17.** Meri | | |
| **18.** Mike | | |
| **19.** Miko | | |
| **20.** Oskar | | |
| **21.** Ŝlej | | |
| **22.** Trev | | |

- *Mirige, unu rolulo ne havas familian nomon (almenaŭ ni ne scias ĝin). Inventu por tiu konvenan familian nomon.*
- *Unu rolulo ricevas alian antaŭnomon en la daŭro de la teatraĵo. Kiu? Kial?*
- *Estas ankaŭ unu sennoma besta rolulo. Kiu? Inventu por ĝi plenan nomon.*

**Daŭrigota. Serĉu la ekzercojn preparitajn por la aliaj scenoj.**
**La solvojn vi povas peti en retmesaĝo ĉe la redaktanto@edukado.net.**